

Juliano ESPERANTISTO



E N H A V O

* * *	Al obstina laboro!	1
* * *	Разширен пленум на ЦК на БЕС	2
* * *	Насоки на ЦК на Българския есперантски съюз по идеологическата работа	3
* * *	La ĉiliaj murdistoj — al la pilorio!	2
	Dimitr K. Izmirliiev. Diĉo Petrov (rememoroj)	7
	Nikolaj Zidarov. Balado pri la ses malplenaj benkoj. Tra- duko de As. Grigorov	9
	Simeon Ĉirpanliev. Neĝo kaj rivereto (fablo)	9
	Kr. Karucin. Renkontiĝo de la sofia esperantistaro kun gvi- dantoj de la E-movado en la socialismaj landoj	10
	Minko Conkovski. Printempa esperantista amuzvespero en Sofio	11
	Rosica Vălcanova. Granda esperantista festo en Kazanlâk	12
* * *	Premiitoj en la konkurso en Kazanlâk	13
	Mirdza Burgmejster. Vespero pri Bulgario	13
	Prof. d-ro Stojan Ĝuĝev. Ĉu fonetika purismo	14
	Roman Grinšpan. Ĉastuŝkoj	III
	Plentagaj sieĝoj fare de la reĝoj	III
	Novaj proverboj	III
* * *	Humuraĵoj. Sciigoj el GDR	III
* * *	Deziras korespondi. Nekrologoj	IV

Sur la kovrilpaĝo:

6-jaraj infanoj prezentas belartan programon en la konkurso en
Kazanlâk (vidu paĝon 12)

*Abonkotizo: jara — 1,40 levoj. Por eksterlando — 3,44 lv., 5 rubloj, 2,50 dola-
roj aŭ egalvaloro. Por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando, Ru-
manio, GDR, Sovetunio — 2 lv., 2,50 rubloj, 1 dolaro aŭ egalvaloro. Aparta nu-
mero — 0,14 lv.*

*Reklamtarifoj: 0,15 lv. por cm²; sur tuta kovrilpaĝo — 80 lv.; korespond-
anoncoj: 5 stotinkoj por ĉiu vorto; eksterlandaj adresoj — publikigataj senpage.*

EKSTERLANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

(Pilaj perantoj el diversaj landoj estas serĉataj)

ITALIO: Julia Franceschi, str. Carducci 32,
Padova.

KOREO: Korea Esp. Asocio, Pieng' jang
P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23
Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, P. O. Box 205,
Bukureŝti 1.

SOVET-UNIO: Ivan Palkin, ul. Ŝvernika,
D. 7, kor. 3, kv. 44, 117 449 Mos-
kva V—449

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109.

**AL OBSTINA LABORO!**

La okazinta en majo ĉ. j. plenkunsido de CK de la Bulgara Esperantista Asocio ankoraŭfoje montris, ke la bulgaraj esperantistoj — heredintoj kaj daŭrigantoj de la demokratiaj tradicioj de la bulgara E-movado, per siaj faroj manifestas ardan patriotismon kaj puran internaciismon kaj estas veraj batalantoj por amikeco inter la popoloj, por paco en la mondo.

La plenkunsido de BEA pritraktis la ĝisnunan laboron de BEA lige kun la decidoj de la plenkunsido de CK de Bulgara Komunista Partio, okazinta en februaro ĉ. j., kiu traktis la problemojn de la ideologia laboro kaj akceptis kompleksan programon por ties plibonigo en la periodo de konstruado de matura socialisma socio en nia lando.

BEA, kiu laŭ sia karaktero estas amasa kulturkleriga organizo de la bulgaraj esperantistoj, ne povis stari flanke de la taskoj, kiujn la Februara Plenkunsido de CK de BKP starigis antaŭ nia lando kaj popolo. Ĝi kaj ĝiaj organizaj unuoj — fakaj sekcioj, distriktaj komitatoj kaj societoj — faris nemalmulte da ideeduka kaj kulturkleriga laboro. Oni regule prelegis pri la problemoj kaj atingajoj en la disvolviĝo de nia lando, pri la teorio kaj la praktiko de la internacia lingvo Esperanto, pri la ideaj problemoj de la E-movado. Oni aranĝis celebroy de notindaj datrevenoj: 25 jaroj de la socialisma revolucio ĉe ni, 30 jaroj ekde la fondo de la Patrolanda Fronto, 100 jaroj ekde la naskiĝo de V. I. Lenin, 90 jaroj ekde la naskiĝo de Georgi Dimitrov k. a. Kreiĝis bona tradicio celebri rondajn datrevenojn de elstaraj vivaj agantoj de la bulgara E-movado. Tio helpas la patriotisman kaj internaciisman edukadon de la juna E-genenacio. La tutlandaj festivaloj kaj recitaloj, kiel tiuj en Târgoviște (1973) kaj Kazanlâk (1974), kontribuas por plialtigo de la idea kaj kultura nivelo de la esperantistoj. Por la laboredukado de la bulgara E-junularo helpas la junularaj E-brigadoj — naciaj kaj internaciaj.

Sed tio, kio estas atingita ĝis nun, ne povas kaj ne devas kontentigi nin. Estas necese doni novan impulson al nia ideeduka kaj kulturkleriga laboro en la spirito de la dokumento, akceptita de nia plenkunsido. Nun nia laboro devas pli trafe respondi al la postuloj, kiujn starigas la hodiaŭa stadio de la disvolviĝo de nia lando, ĝi devas ligiĝi pli intime kun la taskoj pri konstruado de matura socialisma socio kaj pri edukado de la nova homo.

La internaciisma sento, karakteriza por ĉiu bulgara esperantisto, evoluos kaj plifortiĝos surbaze de amikeco kaj unueco kun la esperantistoj de Sovetunio kaj la ceteraj socialismaj landoj, kaj ni, esperantistoj, donos propran kontribuon por efektiviĝo de integriĝo en ĉiuj regionoj de la vivo de niaj frataj landoj. Tiu sento devas manifestiĝi ankaŭ rilate ĉiujn popolojn en



la batalo por paco kaj interkompreniĝo sur la tero — kontraŭ tiuj, kiuj klopodas detrui la pacan vivon de la homoj.

La kulturkleriga kaj ideeduka laboro de ĉiuj asociaj unuoj devas esti direktata al pli da prelegoj, recitaloj, solenaĵoj ktp. En la sekcioj de BEA oni devas ligi la kulturklerigan kaj edukon agadon kun la rekta faka laboro. Sekcioj kiel tiuj de sciencistoj, turistoj, medicinistoj, juristoj, instruistoj k. a. tute ne elĉerpis siajn eblecojn tiurilate, sed estas necese, ke ili varigu siajn ogadformojn kaj aranĝu seminariojn, lekciojn, ekskursojn, renkontiĝojn k. s.

La historio de la bulgara E-movado abundas je ekzemploj de fidela servo al la popolo. Tial ĝia studado kaj pli speciale la studado pri la E-agado en la pasinteco de la naskiĝloko estas neelĉerpebla fonto por alia idea edukado de la esperantistoj.

En la ekzistantaj E-kursoj la lingvoinstruado devas esti pli bone ligita kun la vivproblemoj de nia lando, kun konatigo de l' atingajoj de la progresema monda kulturo.

La internacia korespondado devas helpi la bulgarajn esperantistojn ne nur esprimi siajn personajn pensojn kaj sentojn, sed ankaŭ krei amikecajn ligojn kun eksterlando, gajni novajn amikojn kaj konatigi al ili la atingajojn kaj la belajojn de nia Patrolando, la kulturajn valorajojn de la bulgara popolo, kreitajn kaj konservitajn dum la jarcentoj.

La plenkunsido de CK de BEA montris la direktojn por plua supreniro de la ideeduka kaj kulturkleriga laboro de niaj E-societoj kaj sekcioj. La realigado de tiuj direktoj havas longedaŭran karakteron kaj ilia sorto estas en la manoj de ĉiuj bulgaraj esperantistoj. La tuta eduka laboro de BEA devas esti efika faktoro por plialtigo de la konscienco de la bulgaraj esperantistoj, por formado de socie aktivaj, morale firmestaranataj kaj ideo konvinkitaj homoj, kiuj kun pura koro kaj hela animo kiel Hristo Botev amu sian patrolandon, kiel Georgi Dimitrov laboru por ĝia socialisma supreniro.

РАЗШИРЕН ПЛЕНУМ НА ЦК НА БЕС

На 13 май т. г. в София се състоя разширен пленум на ЦК на БЕС. В неговата работа освен членовете на ЦК участие взеха председателите и секретарите на ОК, председателите на секциите и на дружествата от столицата и други дейци на есперантското движение у нас.

Доклад за работата на БЕС в светлината на решенията на Февруарския пленум на ЦК на БКП по идеологическата работа изнесе членът на Бюро-то на ЦК на БЕС Наню Кючуков. В разискванията по доклада активно участие взеха Асен Григоров, Михаил Данчев, Кръстю Каруцин, Ангел Тодоров, Щерю Кукушев, Генчо Генчев, Георги Идакиев, Траяна Петкова, Цветко Тодоров, Георги Добрев, Манол Чолев,

Йордан Йорданов, Никола Николов, Виолин Олянов, Николай Първанов, Георги Михалков и др. По обсъжданая въпрос пленумът утвърди насоки за подобряване на идейно-възпитателната работа на българските есперантисти.

В работата на пленума участваха др. Иван Александров, зам.-завеждащ отдел „Пропаганда и агитация“ на ЦК на БКП, който поздрави участниците в пленума от името на ръководството на отдела и обърна внимание върху някои главни моменти в работата на идеологическия фронт.

Заклучително слово произнесе председателят на Българския есперантски съюз Никола Алексиев.

НАСОКИ

НА ЦК НА БЪЛГАРСКИЯ ЕСПЕРАНТСКИ СЪЮЗ ПО ИДЕОЛОГИЧЕСКАТА РАБОТА

Пленумът на ЦК на БЕС, състоял се на 13 май 1974 г., въз основа на доклада и решенията на Февруарския пленум на ЦК на БКП, разгледа проблемите на Българския есперантски съюз на идеологическия фронт през периода на изграждането на развито социалистическо общество. Пленумът напълно приема задачите, които БКП — партията-ръководителка, поставя за прелом в идеологическата работа, и ще мобилизира всички сили за преустройство на цялата наша идейновъзпитателна, културно-просветна и практическа работа при използването на международния език, за издигане на социалистическото съзнание на българските есперантисти, за възпитанието на идейно убедени, морално устойчиви и обществено активни личности, които да дават свой принос за социалистическия възход на нашата родина.

Българските есперантисти, организирани в своята патриотична културно-просветна организация — Българския есперантски съюз, както в миналото, така и днес запознават от правилни позиции широките есперантски и неесперантски среди в чужбина с героичната история на своя народ, с неговите завоевания в социалистическото строителство днес, с борбата му за запазване и укрепване на мира, за дружба и сътрудничество между народите.

Пленумът счита за необходимо да продължава и се разширява системата на разработване на теми за просветните събрания на дружествата; съюзите звена да участвуват в общонационалните чествувания на важни дати и бележити годишнини; да се продължи уреждането на рецитали, ораторски конкурси, регионални и местни опознавателни срещи, туристически походи, чествуване на заслужили есперантисти — дейци и пионери на есперантското движение и др.; да се организират разнообразни прояви за манифестиране на нашата интернационална солидарност с борбата на народите за национално и социално освобождение; да участвуват активно в борбата за мир, дружба и разбирателство между народите; да се разширява и укрепва нашето участие в МЕМ.

Българският есперантски съюз да подобрява системно своето участие в УЕА, да укрепва и разширява връзките си с други международни специализирани есперантски организации, както и с националните есперантски съюзи в духа на демократичните традиции на есперантското движение у нас, като отхвърля идеята за неутралност. Тесните контакти с есперантските съюзи и организации от социалистическите страни са основен принцип на съюзната международна дейност. Да се засилва нашето участие в международните есперантски конгреси и други форми и се внася по-голяма насоченост и принципност в нашите прояви в тях.

За осъществяване на задачите за преломно преустройство на нашата идеологическа работа е нужно:

— Да се даде по-широк размах на усилията за подобряване качеството на членския състав на Съюза, като в курсовата работа на дружествата се внесат идеологически насоки, предимно в училищата, висшите учебни заведения, заводите, ТКЗС, учрежденията. Особено голяма е ролята на Българ-



ска есперантска младеж. Новите членове да се въвличат в активна есперантска дейност, като се ориентират правилно в идейнополитическото отношение.

— Да се внесе прелом в културно-просветната работа и в практическото приложение на езика във всички секции на БЕС — учителска, литературна, филологическа, журналистическа, на научните работници, юридическа, железничарска, пощенска, на техниците, като се отбягва прекомерната специализация.

— Българският есперантски театър да насочи вниманието си и към съвременната драматургия.

— Да се повишава равнището на културно-просветната работа в дружествата, да се засили атеистичната пропаганда, да се води енергична борба против чуждите на нашата идеология течения. Да се полагат грижи за по-широко разпространение на хубавата есперантска книга и реномираните есперантски списания.

— Да се разгръща още по-широко международното кореспондиране, като особено се обръща внимание за развиване на връзките между есперантските дружества и отделните есперантисти от побратимените градове и окръзи.

— Да се даде нов тласък за широко сътрудничество в чуждестранния есперантски печат, като се укрепи сектор „Информация“ при Съюза и българската секция на ТЕЖА. Да се подобри есперантската емисия на Радио София. Да се засили сътрудничеството в българския печат.

— Да се осигури редовното издаване на съюзния орган сп. „Булгара есперантист“. Да се стабилизира издаването у нас международно двумесечно сп. „Пацо“, като се положат усилия за увеличаване на неговия тираж и обем.

— Да се направят максимални усилия за възстановяване на списанията „Нунтемпа Булгарно“ и „Рипозой“ и на изданието „Булгарино“ на Комитета на българските жени. Да се осъществи решението на ЦКС неговото списание за чужбина да излиза и на есперанто. Да се предложи на Комитета за приятелство и културни връзки с чужбина да издава годишен литературен алманах „Обзор“ на базата на издаването на английски и френски език списание „Обзор“.

— Да се търси съдействието на съответните инстанции и органи за осигуряване редовно издаване на есперантски книги — художествени произведения, политическа и друга литература, пътеводители, проспекти и др.

— Усилията да се насочат предимно към художествени книги от съвременни автори, сборник статии от Георги Димитров, сборник статии от Тодор Живков, Програмата на БКП, Конституцията на НРБ, албум за Георги Димитров, албум за загиналите в антифашистката борба есперантисти.

— Препоръчва се на Българската есперантска кооперация да издава нови грамофонни плочи с песни, художествено слово и хумор на есперанто, както и с друг подходящ и препоръчан от ЦК на БЕС характер.

Пленумът задължава Бюрото на ЦК на БЕС да разработи конкретни мероприятия в духа на настоящия документ и изразява своята увереност, че организираният български есперантисти ще се заемат енергично и с високо съзнание за практическото осъществяване на тези насоки и ще издигнат равнището на идеологическата работа на БЕС на подобаваща висота.



LA ĈILIAJ MURDISTOJ — AL LA PILORIO!

En la tuta mondo oni protestas kontraŭ la ĉiliaj generaloj, kiuj penas reteni la tajdon de la progreso en tiu sudamerika lando. Ĉi-printempe en Helsinki kunsidis Internacia Komisiono por Esploro de la Krimoj en Ĉilio. La komisiono konsistas el pli ol 50 membroj, apartenantaj al diversaj politikaj movadoj. Antaŭ ĝi aperis dekoj da atestantoj, suferintoj kaj ekspertoj. Estis prezentitaj dokumentoj, fotoj kaj dokumentfilmoj, kiuj helpis senmaskigi la krimulojn.

Ankaŭ en nia lando funkcias Komitato por Solidareco kun la Popolo de Ĉilio. En ĝi estas reprezentitaj la Bulgaraj Sindikatoj, la Junkomunista Unuiĝo, la Ligo de Bulgaraj Virinoj, asocioj de artverkistoj kaj multaj aliaj amasaj organizaĵoj.

Jen pri kio temas.

La 11-an de septembro 1973 grupo da altrangaj oficiroj renversis la laŭleĝe elektitan administracion de prezidento Salvador Allende, plenumante per tio la ordonojn de la usonaj trustoj. Antaŭ la puĉo usonaj agentoj sabotis, organizis strikojn de ŝarĝaŭtomobilistoj, de komercistoj, atencis kontraŭ generaloj lojalaj al Allende kaj aliaj altrangaj personoj. Por kuraĝigi la puĉistojn, usonaj eskadroj minace manovris preter la marlimoj de Ĉilio.

La puĉistoj, dungitaj de la Pentagono, antaŭvidis ekstermi la demokratajn gvidantojn de Ĉilio kaj redoni al la usonaj trustoj la kuprominejajn entreprenojn.

Antaŭ ol entrepreni la puĉon, la faŝistaj generaloj senarmigis ĉiujn oficirojn, fidelajn al Allende, post kio bombardis la palacon de la prezidento. El la kazernoj eliris armitaj ĝisdente soldatoj kaj atakis la fabrikojn kaj la laboristajn kvartalojn.

Ekfuriozis faŝista teroro. Pereis heroe Allende, batalante per armilo en

la manoj kontraŭ la faŝistoj, pereis miloj da laboristoj. Oni arestis kaj torturis ne nur politikajn gvidantojn, sed ankaŭ ordinarajn civitanojn, kiuj ne aprobis la puĉon. Se iu sukcesis kaŝi sin, oni arestis liajn familianojn. Virinojn oni senhonorigis. Infanoj estis forprenataj disde siaj patrinoj kaj ŝlosataj en prizono. Ekfunkciis koncentrejoj, similaj al tiuj de la germanaj nazioj.

Milittribunaloj verdiktis kontraŭ la deputitoj de la laŭleĝe elektita parlamento. Al la juĝatoj oni ne permesis dungi advokatojn.

La diktaturo de la oficira hunto malpermesas ĉian politikan agadon, malpermesis centojn da ĵurnaloj kaj gazetoj, aranĝis aŭtodafeon por la ĉilia kulturo — la barbaroj bruligis revolu-

La faŝista hunto en Ĉilio furiozas . . .



cian literaturon, samkiel agis la hitleranoj antaŭ 40 jaroj.

La laboristan klason oni senigis je ĉiuj rajtoj. La laboristoj jam ne rajtas organizi sin en profesiaj unuigoj, ne rajtas postuli pli altan salajron. Al la laboristaj infanoj estis forprenita la laktio, kiun la administracio de Allende disdonis senpage.

La „zorgoj por la junularo“ esprimiĝis en eksigo de centoj da profesoroj kaj ilia anstataŭigo per oficiroj, kiuj nun „instruas“ la studentojn. La hunta ĉefo Pinoĉet deklaris, ke la junularo devas esti edukata en spirito de antikomunismo.

Laŭ germanfaŝista maniero la hunto persekutas la alirasanojn, kiel ekz. indianojn kaj ciganojn, per kio ĝi malrespektas la deklaron de UNO pri la homaj rajtoj. Same kruele la hunto procedas kontraŭ la fremdlandanoj, kiuj venis por serĉi politikan azilon en Ĉilio. La plimulton de ili oni arestis kaj murdis. Apartaj personoj savis sin, rifuĝinte en diversajn ambasadorejojn. Laŭ la Viena Konferenco de 1961 j. neniu registaro rajtas penetri en ies ambasadorejon. Malgraŭ tio la hunto ordonis, ke soldatoj

ataku la ambasadorejon de Kubo. La faŝistaj policanoj malbontraktis la diplomatojn de Sovetunio kaj Svedio.

Jen pro kio en la tuta mondo oni indignas kaj protestas kontraŭ la sangversa hunto kaj ĝia protektanto — la usona imperiismo. Jen pro kio oni postulas, ke neni ŝtato rilatu kun la nuna krima regpotenco en Ĉilio. Ĝi devas esti morale kaj materiale izolita.

La pli aĝa generacio de la bulgaraj esperantistoj bone memoras, kiel antaŭ 50 jaroj la faŝistaj generaloj renversis la leĝe elektitan demokratian registaron de Aleksandro Stambolijski kaj senkompatate ekstermis pli ol 30 000 civitanojn, inter kiuj la prezidanton de la ministra konsilantaro mem. Sed malgraŭ la kruela faŝista diktaturo la bulgara popolo sukcesis venki la puĉistojn.

La bulgaraj esperantistoj, fidelaj al la principo de humaneco kaj demokrateco, aliĝas al la postuloj de la liberamaj popoloj sub la sloganoj:

Liberigon al ĉiuj antifaŝistoj en Ĉilio, inter ili Luiso Korvalan kaj Klodomiro Almeida!

Restarigon de la homaj rajtoj en Ĉilio!

Al la pilorio la ĉiliajn murdistojn!

AL LA KOMITATO POR DEFENDO DE ĈILIO

SOFIO

La sofiaj esperantistoj, kolektiĝintaj en tuturba kunveno-renkontiĝo kun reprezentantoj de la Esperanto-asocioj kaj movadoj en Sovetunio, GDR, Pollando, Ĉeĥoslovakio, Hungario kaj Bulgario esprimas sian plej grandan indignon kaj proteston pro la kruela teroro de la militista hunto kontraŭ la ĉilia popolo. Ni plej energie insistas, ke oni ĉesigu tiun sangan teroron kaj restarigu la demokratiajn rajtojn de la ĉiliaj civitanoj.

Sofio, 2. IV. 1974

DE LA KUNVENO

Okaze de la Tago de la Medicinlaboristoj — la 7-an de aprilo — la Ŝtata Soveto de Popola Respubliko Bulgario distingis per ordenoj kaj medaloj multe de kuracistoj pro iliaj meritoj sur la kampo de la medicina scienco kaj la praktika kuracista agado.

Inter la distingitoj per „Popola Ordeno de Laboro — ora“ estis ankaŭ d-ro STOJAN MORARESKU, konata bulgara esperantisto. Ni gratulas!



Sinjoro Prezidento,

La sofiaj esperantistoj en tuturba kunveno-rekontiĝo kun reprezentantoj de la Esperanto-asocioj en la socialismaj landoj je la 2-a de aprilo j. k. esprimas sian fortan indignon kontraŭ la konstanta rompado de la Pariza Interkonsento pri establigo de paco en Vjetnamio. La rompado faras la administracio de Sajgono, kiu organizas perarmilajn atakojn kontraŭ la teritorioj, regataj de la Demokratia Vjetnama Registaro, ne restarigas la demokratiajn rajtojn kaj liberecon de la vjetnama popolo sur la teritorio troviĝanta sub regado de la pupa administracio de Sajgono kaj ne liberigas milojn da patriotoj vivantajn ĉe ege mizeraj kondiĉoj en koncentrejoj kaj malliberejoj.

Ni firme insistas, ke Usono ĉesigu sian materialan kaj moralan milit-helpon al Sajgono! Nur tiam la popolo de Suda Vjetnamio povos vivi en paco, nacia sendependeco kaj libero.

Sofio, 2. IV. 1974

DE LA KUNVENO

DIĈO PETROV

Rememoroj

Lin mi bone konis. Ni amikiĝis la 11-an de decembro 1941 jaro ĉe la stacidomo de urbo Bitolja, Macedonio. Ĉi tie ni estis mobilizitaj por militservi kiel rezervaj oficiroj. Tiel okazis, ke ni luis komunan ĉambron.

Li estis junulo fortstatura, brunokula kaj brunhara, kun delikataj lipharoj. Lia tuta eksteraro imponis. Mi eksciis, ke li naskiĝis je la 16-a de novembro 1919 en v. Progled, Smoljan-distrikto, en la sino de Rodopi-montaro. Diĉo ŝatis paroli pri la beleco de sia naskiĝvilaĝo kaj pri la ĉarmo de la montaro. Mi ankaŭ estas montarano, sed devenas de alia pitoreska regiono — Pirin-monto. Sed ni proksimiĝis anime ne pro tio, ke ni ambaŭ estas montaridoj, sed pro tio, ke ni estis popolaj instruistoj, „popolaj oleolampetoj“, kiel

li mem esprimiĝis. Kaj ĉefe pro tio ke ni ambaŭ strebis al la plej progresema homama idealo — la komunismo.

Nia loĝejo troviĝis sur str. Vardar, kontraŭ la oficira klubejo. Montriĝis, ke niaj dommastroj estas ankaŭ progresemaj homoj.

Ilia filino, serĉata de la polico, forkuris, kaj ni subtenis la familion, helpante sian kaŝadon. La nomo de la filino estis Milica.

Multon rakontis Diĉo al mi pri siaj infanoj-lernantoj kaj pri siaj junulaj jaroj. Fininte la fundamentan lernejon li ege deziris studi en muziklernejo, sed la malriĉeco de la gepatroj ne permesis al li tion. Feliĉe ke li hazarde tralegis en ĵurnalo, ke en la meza pedagogia lernejo en u. Ŝumen la ŝtato pagas la elspezojn por studado.

Kune kun sia kuzo Dimitr Manolov Diĉo sukcese faris la akceptekzamenon.

En la lernejo ambaŭ kuzoj, Diĉo kaj Dimitr, vigle partoprenis la agadon de la abstinula kaj esperantista societoj, en kiuj regis progresemaj ideoj. Baldaŭ Diĉo ellernis Esperanton kaj komencis viglan korespondadon kun eksterlandaj esperantistoj. Esperanton li neniam plu forlasis. Ĝin li propagandis en sia vilaĝo, en la vilaĝoj, kie li instruis, eĉ en la kazerno.

La studadon en Ŝumen li kaj lia kuzo finis kun bonega sukceso. Lokojn de instruistoj ili ricevis tuj en la najbaraj rodopaj vilaĝoj Sokolovci kaj Momĉilovci. Diĉo Petrov faris multon por la edukado ne nur de siaj lernantoj, sed ankaŭ de iliaj gepatroj. Tamen post unu jaro li estis eksigita pro siaj komunistaj ideoj. Kaj lernantoj, kaj gepatroj kun doloro disiĝis kun sia instruisto.

Post kelka tempo li estis denove enoficigita kiel instruisto en la fora rodopa vilaĝo Sărnică, kie, malgraŭ la persekutado de la faŝistoj, li restis ĝis la printempo de 1940 j., kiam li devis eniri la lernejon por rezervaj oficiroj.

Kiel oficiroj en la speciala milittrupo ni agitis inter la soldatoj, ke ili ne pafu kontraŭ la persekutataj partizanoj, sed pafu alten en la aero. En junio 1943 oni retiris min'al la inter-

no de Bulgario kaj ĉin oni nomis komandanto de la landlima militposteno ĉe v. Konsko, regiono de Gevgeli. Plu mi ne vidis lin.

Konata estas lia historia heroaĵo. La 25-an de decembro 1943 li kune kun ĉiuj soldatoj kaj serĝentoj de la estrita de li milittrupo aliĝis al la partizanoj — la batalantoj kontraŭ la naciistaj okupantoj kaj la propraj faŝistaj regantoj. La stabo de la partizanoj decidis, ke la brava milittrupo estu la unua bulgara soldata partizana bataliono kaj donis al ĝi la nomon de la glora poeto-revoluciulo Ĥristo Botev. Kiel komandanto de la bataliono estis nomita leŭtenanto Diĉo Petrov.

Sekvis tiom da venkoplenaj bataloj kun la faŝistaj milittrupoj kaj policaj taĉmentoj, ke la unua soldata partizana bataliono „Ĥristo Botev“ famiĝis tra la tuta lando kaj en eksterlando. Komen- ciĝis la glora marŝado de la bataliono tra la Balkano al la centro de Bulgario. En peza batalo kontraŭ la dekoble pli multnombra kaj bonege armita malamiko je la 23-a de majo 1944 apud v. Batulia, 30 km de la ĉefurbo Sofia, pereis pafante ĝis la lasta spiro la legenda komandanto Diĉo Petrov, jam pro merito proklamita kolonelo. Tiam li havis nur 25 jarojn.

Dimitr K. Izmirliĉev

DIPLOMTEZO EN ESPERANTO

Finante sian specialiĝon pri la patenta agado, diplomita ing. Bojidar Leonov — longjara prezidanto de STELO kaj komitatano de UEA, sukcese defendis sian tezon pri la temo „La lingva problemoj en la patent-teknika informado kaj la ebleco por ĝia solvo per enkonduko de Esperanto“. En la laboro estis sciencie traktataj la demandoj koncerne la lingvan problemon ĝenerale kaj en la fako de la scienco kaj teknika informado, la historio de la projektoj por solvo de tiu problemoj, la rimarkoj de la patenta dokumentado kaj la rolo, kiun povus ludi ĉi tie la internacia lingvo Esperanto. Estis reprezentitaj sciencaj konkludoj pri tiu problemoj.

La defendo vekis intereson ĉe la neesperantista scienca publiko.



Poezio kaj beletrio

BALADO PRI LA SES MALPLENAJ BENKOJ

de Nikolaj Zidarov

Se bunte vestite septembro alvenas,
se juna aŭtun' de la mont' malsuprenas,
se flave avela branĉet' sin koloras —
alvoke tintil' jastrebinaj¹ sonoras,
kaj vibras la lumo tenere kaj mole —
la ĉefinstruisto komencas kontroli:

— Stojan Petrov Kalajĝijski?
Aŭdigis sin benko:
— Pereis por venko.

Ekserĉis okule en sia registro
kaj plue elvokis la ĉefinstruisto:
— Dimitrinka Petkova Stoičkova?
La dua benk' diris:
— Forpasis, foriris.

La klaso l' arbaron rigardas silente —
voĵeto al tombo zigzagas serpente.

— Ivan Petrov Kalajĝijski?
Benk' tria respondis:
— La vivon li donis.

Sterniĝas la kalva kamparo en stoploj,
ĉe l' vojo solece tremetas la poploj.

— Nadejda Petrova Kalajĝijska?
Respondis la kvara:
— Ŝi mortis, la kara.

La birdoj sur branĉoj kaj dratoj silentas.
La pluvo-gutetoj lampire argentas.

— Ivan Stefanov Vasilev el Prisojna?
La kvina benk' veis:
— Li brave pereis.

Sur verda herbejo pro vento, malseko,
per hufoj ektermas la cervoj kun bleko.

— Cvetanka kaj Genka Ivanovi Dimitrovi?
La sesa benk' vortis:
— Ho ve, ili mortis.

La lum' de l' portretoj neniam ekpalas,
ĉar ĝi el l' okuloj radias kaj klaras!

Ho, ili ĉeestas ĉe ĉiuj kontroloj —
la ses jastrebinaj geknaboj petolaj,
kaj ankaŭ Ivan el Prisojna — kunfrato,
sed nun en mantelo de vera soldato,
postenas en kronoj, brodaĵoj kaj freskoj,
sub grandaj portretoj de Boŝev kaj Levski.

El la bulgara: Asen Grigorov

¹ Jastrebinio — vilaĝo en la distrikto de Targoviŝte, apud kiu la faŝistaj barbaroj mortigis 7 infanojn kune kun iliaj gepatroj. Inter la infanoj estis ankaŭ tri gefratoj: Stojan, Ivan kaj Nadejda Hadĵijski.

NEĜO KAJ RIVERETO

Fablo de Simeon Ĉirpanliev

La neĝo flugis super la rivereto kaj kovris ĝiajn du bordojn.

— Bonan venon, frato mia, — ride-
tante diris al ĝi la rivereto. — Estus
tre agrable al mi, se vi ripozus sur
miaj bordoj. Ni konversacios kiel bo-
naj najbaroj kaj egalrajtuloj ĝis la fino
de la vintro.

La neĝo ofendigis, frostige elspiris
por glaciigi la rivereton kaj diris:

— Vi ne estas egala al mi, tial ni
ne povas konversacii kiel egalrajtuloj.

Vi loĝas sur la tero kaj rampas kiel
serpento. . . Mi loĝas en la ĉielo kaj
flugas tra la aero. Kia egalrajteco po-
vas esti inter ni? Mi ne deziras, ke
vi parolu kun mi. Sed se vi volas
sciigi ion al mi, vi diru ĝin ofice al
la nebulo, kaj ĝi raportos al mi.

La rivereto rediris:

— Ni estas egalrajtaj, ĉar mia esen-
co estas la sama. Mi kaj vi estas fa-
ritaj el akvo.

— Tio ne estas vera! Mi loĝas en



la altaĵo, vi — en malaltaĵo, — kriis la neĝo.

— Vi loĝas alte, sed la suno loĝas multe pli alte ol vi. Ni demandu ĝin, ĉu ni estas egalrajtaj.

— Bone, malbelulo, ni demandu ĝin, — denove ekkriis la neĝo. Kaj ili demandis la sunon. Ĝi respondis:

— Vi estas egalrajtaj, sed laŭ via laboro vi okupas diversajn lokojn en la naturo.

— Ni ne estas egalrajtaj! — obstinis la neĝo.

La suno koleris kaj diris:

— Mi estas la supera leĝo en la naturo, kaj mia vero estas deviga por ĉiuj.

— Ĝi ne estas deviga, — malestime diris la neĝo.

Por pruvi al la neĝo, ke ĝi ne estas prava, la suno komencis forte ardi. La neĝo eksentis akrajn dolorojn kaj komencis degeli.

— Ho, suno, ne punu min tiel kruele per via fajro, — petis ĝi.

— Mia fajro ne estas kruela, sed justa vero, ĝi ne punas, sed edukas.

Kaj la suno ardis plu, ĝis degelis la tuta neĝo. Ĝi transformigis en akvon, kiu komencis vagadi sur la tero sen ia ajn vojo. La neĝo ekploris.

— Ne ploru, frato mia, — konsolis ĝin la rivereto.

— Mi ploras, ĉar mi ne havas jam mian vojon.

— Enfluu min, kaj tiel vi havos vian vojon kaj lokon en la naturo.

— Ĉu vi akceptos min?

— Jes. Sed memoru bone tiujn ĉi vortojn: ni ĉiuj — mi kaj vi, la nebulo, la nubo, la lago, la marĉo kaj la maro estas samaĵo — akvo. Tial ni estas egalrajtaj. Sed multaj el ni, suprenirinte alten, forgesas nian egalecon kaj ofendas la aliajn. Ili rifuzas iliajn rajtojn kaj rilatas orgojle al ili. Sed neniuj devas forgesi, ke la loko de ĉiu en la naturo estas grava.

— Mi dankas al vi, frato mia, kvankam mi tro malfrue komprenis la veron pri nia frateco, — diris la neĝo kaj enfluis la riveron.

Ili kune ekiris al la granda rivero.

ORGANIZA VIVO

RENKONTIĜO DE LA SOFIA ESPERANTISTARO KUN GVIDANTOJ DE LA E-MOVADO EN SOCIALISMAJ LANDOJ

De la 31 de marto ĝis la 2 de aprilo ĉ. j. en Sofio okazis Konsulta Renkontiĝo de gvidantoj de la E-asocioj en Ĉeĥoslovakio, Germana Demokratia Respubliko, Hungario, Pollando, Sovetunio kaj Bulgario. Oni pritraktis la problemojn de pli efika kunlaborado por utiligo de Esperanto serve al la pachtalo kaj ĝenerale por plua disvastigo de la Internacia lingvo en tiuj landoj.

La 2-an de aprilo — la lastan tagon de la Renkontiĝo — la Distrikta-Urba Komitato de Bulgara E-Asocio en Sofio organizis en la Kulturdomo de la Komerclaboristoj grandan publikan kunvenon-renkontiĝon de la sofiaj esperantistoj kun la gastoj.

La kunvenon malfermis la prezidanto de DK de BEA Georgi Dolapčiev. Sekvis eldiroj de la gvidantoj de apartaj delegitaroj.

Nikola Aleksiev — prezidanto de Bulgara E-Asocio, donis altan pritakson pri la rezultoj de l' Konsulta Renkontiĝo. Ĝiaj decidoj havas pozitivan efikon kiel por la E-movado en la prezentitaj landoj, tiel ankaŭ por la E-movado en tutmonda skalo.

Béla Berceli — sekretario de Hungara E-Asocio, direktis varmajn vortojn al la bulgaraj esperantistoj, kiuj „okupas unu el la unuaj lokoj en la internacia E-movado“. Li rakontis pri la lastaj sukcesoj de HEA: aperigo de monata ilustrita revuo „*Esperanto Magazin*“ en hungara lingvo, eldonkvanto de 10 000 ekz., aperigo de E-revuo „*Juna Amiko*“, eldonkvanto de 5000 ekz., eldonado de belartaj libroj kaj lernohelpiloj.

La reprezentanto de la sovetaj esperantistoj prof. **Vasilij Juskoviĉ** parolis pri la favora



rilato de multaj sovetaj sciencistoj kaj verkistoj al Esperanto.

Stanislaw Swistak, prezidanto de Pola E-Asocio, rakontis pri la sukcesoj de la Pola E-movado post ĝia pasintjara granda nacia E-kongreso: eldonado de novaj lernolibroj kaj vortaroj de Esperanto. Antaŭstaras apero de ampleksa informlibro „Pollando — faktoj kaj informoj“. Notinda sukceso estas ankaŭ la enkonduko de Esperanto en la laboron de la ŝtata avia kompanio „Lot“.

La sekretario de Slovaka E-Asocio **Pavel Rosa** rakontis pri la granda aktiveco de la slovakaj esperantistoj prepare al la celebrego de la 30-a datreveno de la slovakaj ribelo kontraŭ la naziaj okupantoj, en kiuj pereis ankaŭ multaj slovakaj kaj ĉeĥaj esperantistoj.

Zdenko Krimsky, sekretario de Ĉeĥa E-Asocio, priskribis la agadon de la esperantistoj en Ĉeĥa Socialisma Respubliko. Li sciigis, ke krom nova eldono de la konata E-krestomatio „Paŝoj al plena posedo“ en la kuranta jaro aperos

ankaŭ 3^a E-libroj.

Laste en la kunveno parolis **Detlev Blanke** — sekretario de Centra Laborrondo de Esperanto en GDR. Li esprimis la profundan dankon de la civitanoj de GDR al la granda filo de la bulgara popolo kaj eminenta aganto de la internacia laborista movado **Georgi Dimitrov**, kiu havas la historian meriton doni la unuan ruinigan frapon al la naziismo. La aŭtoro pri-lumis ankaŭ kelkajn faktojn el la pasinteco de la Laborista E-movado en Bulgario, kiujn li malkovris dum siaj esploroj pri la historio de la internacia laborista E-movado.

Fine la kunveno akceptis protestan rezolucion kontraŭ la sanga teroro de la faŝista militista hunto en Ĉilio, pri liberigo de Luis Korvalan kaj ĉiuj aliaj politikaj malliberuloj en tiu lando. Oni akceptis protestan telegramon ankaŭ al la usona prezidento **Nixon** lige kun la daŭra helpo de Usono al la Saigona kliko en Suda Vjetnamio.

Kr. Karucin

PRINTEMPA ESPERANTISTA AMUZVESPERO EN SOFIO

Dediĉe al la 30-a datreveno de la socialisma revolucio en Bulgario, la 23-an de marto ĉ. j. en plenplena salono de la Asocio de Juristoj, en Sofio okazis granda esperantista amuzvespero. Publiko — ĉirkaŭ 600 personoj el esperantistoj kaj iliaj amikoj.

Grandan meriton por la amuzvespero havas k-do **Genĉo Genĉev** — prezidanto de la Esperanto-Sekcio „Justeco“ ĉe la Asocio de Juristoj en Bulgario (AJB). Li ne nur iniciatis kaj organizis la vesperon, sed ankaŭ sukcesis konvinki la Estraron de AJB disponigi la salondon senpage.

La amuzvespero komenciĝis per parolado de k-do **Genĉev** pri la internacia lingvo Esperanto. Li alvokis al bona ellernado, regado kaj uzado de Esperanto kiel dua lingvo post la gepatra, lingvo de kompreniĝo inter la popoloj, de paco sur la tero.

Sekvis rica belarta programo, kiun gvidis k-dino **Vasja Petrova**. Ĝin partoprenis: **Lidija Oŝavkova** — flutolistino de la Sofia Ŝtata Filharmonio (muzikaĵoj de **Gluk**), **Kunĉo Vălev** („La vojo“ de **Zamenhof**), **Kiril Popov** — profesia artisto (la poemon „Patrolando“ de **Penjo Penev**), **Maria Angelova** — kantistino („Mi enamiĝis por suferi“ de **Sergej Rahmaninov** kaj ario el la opero „Somnambulo“ de **Belini**), akompanata je piano de **Ĝulija Ganeva**, **Ĵorĵeta Zdraveva** (el la poemo „**Nikodim**“ de **Krum Kjuljajkov**).

La geedza paro **Belka Beleva** kaj **Anani Anev** — artistoj de la Bulgara Esperanto-Teatro, prezentis satirajn teatraĵojn („Mallonga vespera kverelo“ de **Nikolaj Ŝirov**—**Taras**, kiun partoprenis ankaŭ ilia filo-lernanto **Veselin**, kaj

„Terura vizitanto“ de la pola verkistino **Stefana Grozdinska**).

Miŝo **Zdravev** — konata esperantisto-estrada kantisto plenumis estradajn kantojn („**Tanja**“, „**Mari**—**Pepa**“ kaj „**Mia gitaro**“ — teksto kaj muziko de li mem, kaj „**Unu knabino el Londono**“ — teksto lia kaj muziko de **Beatles**). Akompanis lin la orkestro de la junulara estrada ensemblo ĉe **Modela Legejo „Rakovski“**, direktata de **Banko Bankov**.

La artisto de la Bulgara Esperanto-Teatro **Mihail Ĉobanov** plenumis la humuran versaĵon „**Striko en la Paradizo**“ de nekonata aŭtoro kaj la fablon de **Krilov** „**Ezoko**“.

La belarta programo finiĝis per 6 estradaj kantoj, plenumitaj de la Ensemblo.

La publiko restis tre kontenta pro la arte plenumita varia programo.

Sekvis dancoj kaj ĝoja kunesto ĝis noktomezo. Ludis la sama orkestro.

Estus bone, se en ĉiuj loĝlokoj, kie agas E-societoj aŭ grupoj, oni organizus literaturmuzikajn kaj dancvesperojn. Ili estas bona formo de propagando kaj varbado de novaj adeptoj de la Esperanto-movado.

Minko Konovski

Oni povas aboni ankaŭ individue „Bulgarian Esperantiston“. Sendu abonkotizon rekte al la redakcio!

GRANDA ESPERANTISTA FESTO EN KAZANLĀK

Bela tradicio — la festo de la Esperanto-parolo, revolucia poezio kaj kanto — kunvenis je la 6—7 de aprilo en urbon Kazanlāk pli ol 600 esperantistojn reprezentantojn el la tuta lando.

La dommastroj prizorgis ĉion. Sur la ekburĝonintaj arboj mallalte susuris verdaj standardoj. Bonvenigaj sloganoj haltigis la rigardon de la entuziasmaj gastoj. En la antaŭsalono de la fama Popola Legejo „Iskra“ (Fajrero) multaj tabuloj kaj fotoj rakontis pri la 70-jara historio de la loka E-Societo „Roza Valo“, pri tiuj, kiuj donis la komencon. Ankaŭ pri la sindonaj esperantistoj-kontraŭfaŝistoj, kiuj ne ĝisvivis la liberon, kaj pri tiuj, kiuj daŭrigas la batalon, por ke la nobla ideo de Esperanto trovu pli fekundan grundon, altiru novajn milojn da adeptoj. Ĉe la kolektantoj de insignoj sendube grandan intereson vekis la buntaj tabuloj kun dekoj da malgrandaj insignoj el ĉiuj anguloj de la mondo. Krome oni povas aĉeti interesan emblemon aŭ bildkarton, ricevi informilon pri ĉiuj Esperanto-aranĝoj dum la jaro, refreŝigi sin per malvarma trinkaĵo.

La kultura festo estis inaŭgurita la matenon de la 6-a. Estis prezentitaj diversaj salutoj, inter kiuj ankaŭ en la nomo de la Urba Komitato de Bulgara Komunista Partio kaj de la Urba Popola Soveto — fare de ing. Stanĉo Koev, prezidanto de la Soveto, kaj en la nomo de la Bulgara Esperantista Asocio — fare de k-do Nano Kjuĉukov, membro de la Estraro de CK de BEA.

Post la inaŭguro estis prezentita florkrono antaŭ la bustomonto de la fama kontraŭfaŝisto kaj esperantisto generalo Cvjatko Radojnov, pereinta en la batalo.

Posttagmeze, laŭ anticipe ellaborita plano en la salono de legejo „Iskra“ komenciĝis la sinprezento de ensembloj, grupoj kaj unuopaj

plenumantoj. En daŭro de kvar horoj la spektantoj ĝuis la Esperanto-parolon kaj kanton de talentaj recitantoj, kantistoj, kanthoroj de junpioniroj kaj de plenaĝuloj, admiris la ludon de junaj dancantoj kaj rekompencis ĉiun prezenton per entuziasmaj aplaŭdoj.

La vesperon por la ŝatantoj de la teatra arto la loka dramteatro prezentis la dramon „La monaĥo kaj liaj filoj“. La gaja kunesto daŭris ĝis post la noktomezo en la junulara domo. La junaj homoj vigle amuzis sin per humuraĵoj, muziko, dancoj.

La 7-an antaŭtagmeze la belarta konkurado daŭris plu. Tagmeze la ĵurio, kiun partoprenis Violin Oljanov kaj Stojan Kostadinov el Sofio kaj Kosta Bojaĝiev, aktoro el la Teatro de Kazanlāk, jam anoncis la rezultojn. Partoprenis plenumantoj el 16 societoj de 14 urboj.


En mallonga konferenco de la gvidantoj de ĉiuj grupoj, de la membroj de la ĵurio kaj de la organiza Komitato oni pridiskutis la programon, kritikis iujn mankojn kaj faris utilajn rekomendojn. Konstatinte, ke la tempo por preparo ne estis sufiĉa kaj ke mankis klareco pri kelkaj kondiĉoj de partopreno (aĝo, ĝenroj, amplekso de la apartaj programeroj ktp), oni emfazis la neceson estonte zorgi pli multe pri la lingva kaj arta nivelo de la programo, pri sufiĉe frua diskonigo de kondiĉoj, premioj ktp.

Posttagmeze la gastoj havis eblecon konatiĝi kun la vidindaĵoj de Kazanlāk kaj ĝia ĉirkaŭaĵo, fari ekskursetojn al la legenda montopinto Stoletoŭ kun la majesta Monumento de la Liberigo, spiri la puran aeron de la ĉarma Roza Valo.

Ĉiuj ekveturis al siaj loĝlokoj kunportante la varmon de dekoj da manplatoj kaj ridetoj kaj la sinceran „Ĝis revido, karaj amikoj!“

Rosica Vălcanova

Antaŭ la legejo „Iskra“



en la konkurso de la Esperanta parolo, revolucia poezio kaj kanto en Kazanlâk:

I. Kanthoroj

Junpionira kanthoro de Tolbuĥin.
La kanthoro ĉe la Distrikta E-Komitato de Burgas.

II. Koiektiva recitado

I premio: Madan
II premio: Asenovgrad
III premio: Haskovo
Kuraĝiga premio: Vraca (infanoj de antaŭ-lerneja aĝo — 6-jaraĵ)

III. Estradaj prezentoj

I premio: Asenovgrad
Kuraĝiga premio: dancensemblo de Pleven

IV. Individuaj recitantoj

I premio: Ĵorĵeta M. Zdraveva — Sofio
II premio: Petra Georgieva — Tolbuĥin
III premio: Dimitriĉka Ivanova — Tolbuĥin
IV premio: Marijka Stefanova — Târgoviște
Kuraĝiga premio: Johana Antonova — programanoncanto de Pleven

V. Individuaj kantplenumentoj

I premio: Goran Lekov — Stara Zagora
II premio: Jordanka Georgieva — Asenovgrad
La ĵurio decidis, doni *kuraĝigajn premiojn* ankoraŭ al: la kanthoro de Târgoviște; la kanthoro de Pleven; Conka Nikolova de Asenovgrad, Sabina Kovaĉeva de Sofio, Slaveja Karaĝova de Haskovo.

TRA LA E★ MONDO

VESPERO PRI BULGARIO

La 30-an de januaro 1974 en la Esperanto-Klubo de Riga okazis la laŭvica vespero pri socialismaj landoj. Ĉi-foje ĝi estis dediĉita al Bulgario.

Jĉ temo „Bulgario — ĝia politiko, ekonomio kaj kulturo“ prelegis la prezidanto de la E-Klubo k-do Eduardo Jaunvalks. La Esperanto-poetino Elvira Lippe skizis la agadon de du elstaraj bulgaraj esperantistoj el diversaj generacioj — Ĥsen Grigorov kaj Venelin Mitĉev. Ŝi montris ankaŭ multajn en Bulgario eldonitajn numerojn de „Nuntempa Bulgario“ kaj „Bulgara Esperantisto“, en kiuj estis aperigitaj sciigoj pri la E-movado en Latvio kaj latvaj E-eldonajoj.

La veteranino de latvia E-movado Otilija Vetra pasintjare pasigis kelkajn monatojn en Bulgario, kie ŝi renkontiĝis kun multaj bulgaraj gesamideanoj. Ŝi rakontis pri tio, kion ŝi vidis en Bulgario, pri la Bulgara E-movado, pri interesaj renkontoj, sed precipe ŝi substrekis la varman bulgaran gastamon, kiu tre korusis ŝin.

M. Burgmeister rakontis pri la latva filio de Societo „Bulgario — USSR“, kies prezidanto estas la elstara latva verkisto Zans Griva. Dum la hispana civitana milito li batalis en unu sama taĉmento kun bulgaroj. Poste, troviĝante en koncentrejo en Francio, li lernis Esperanton.

Parolis ankoraŭ T. Bĉrcis, A. Medinš k. a. Ekspozicio prezentis pri Bulgario abundan materialon el bildkartoj, revuoj, turismaj prospektoj, poŝtmarkoj k. a. eldonitaj en Esperanto, bulgara, rusa, germana kaj aliaj lingvoj.

Finante la vesperon, oni laŭtleĝis salutleterojn kaj poŝtkartojn, kiujn bulgaraj samideanoj multnombre (plej multe el Ruse — la ĝemela urbo de Riga), sendis al ni. Elkoran dankon al ĉiuj gratulintoj!

Vivu la amikeco inter Latvio kaj Bulgario! Fariĝu pli sincera la kontakto inter la bulgaraj kaj latvaj esperantistoj!

Mirdza Burgmeister

HEREDAĴOJ

Por plue progresigi la E-movadon kelkaj fidelaj kaj sindonaj esperantistoj, forpasintaj dum la lastaj 3 jaroj, testamentis diversajn havaĵojn aŭ monsumojn al UEA:

f-no Wijkje Steffering el Nederlando — 8000 guldenoj;
f-no Klara Râz el Svislando — 440 gld.;
s-ino Clew en Los Angeles el Usono — 611 gld.;
s-ro William Hudson King el Nov-Zelando — 183 gld.

Laŭ „Esperanto“, n.ro 12/1973



ĈU FONETIKA PURISMO?

(Daŭrigo de la artikolo de prof. d-ro Stojan Ĝuĝev el n-ro 3-4)

En la sfero de la etnaj lingvoj, kie la parolo fariĝas ofte esprimilo de la nacia digno kaj de la patriota eduko, la „pura“ prononco estas konsiderata kiel signo de alta socia virto, kiel marko de intelekta kaj morala plivaloro.

Certe ne tia estas la kazo de la internacia lingvo kaj speciale la kazo de Esperanto, kie regas pli granda internacia toleremo, kie sentiĝas pli granda demokratieco kaj libereco kaj kie la tradicioj de la elparolado ne estas tiel rigoraj kiel ĉe la malnovaj etnaj lingvoj. Cetere, eĉ en la plej rigide kristaliĝintaj grandaj kulturlingvoj — la angla, la ĉina, la rusa kaj la franca — ekzistas multaj kazoj de hezito pri la prononco kaj oni tre ofte aŭdas por la sama fonemo aŭ por la sama kunmeto de fonemoj multajn, malsamajn sonojn, malsamajn prononcmankojn — ĉiuj akceptitaj en la bona socio kiel „korektaj“. Malgraŭ la tendenco de iuj „puristoj“ unuecigi la elparoladon de la naciaj lingvoj, la deflankiĝoj de la normoj ekzistas kaj persistas ne nur ĉe la diversaj dialektoj, sed ankaŭ en la prononcado de la komuna literatura lingvo. Ekzemple ĉiu franco elparolas kun specifa *nuanco* la fonemojn kaj la sonkunmetojn de la franca literatura lingvo, kaj tiu ĉi *nuanco* de prononco ofte perfidas lin, malkaŝante lian regionan devenon. La sperta orelo de l' aŭskultanto povas facile diveni, ĉu la literature parolanta franco loĝis en Pikardio, en Gaskonio, en Normandio, en Provenco aŭ en la Pariza regiono. Sed, aliflanke, ĉiu parizano havas sian propran, personan prononcmankon, siajn proprajn nuancojn de la fonemoj, kiuj senteble diferencas de la prononcmankoj de l' aliaj parizanoj. Eĉ plie, la sama individuo en diversaj momen-

toj de sia ekzisto prononcas malsame la oscilogramoj, kiujn oni faris en la laboratorioj de eksperimenta fonetiko montras, ke aparta vokalo aŭ eĉ konsonanto, kiun oni prononcas en malsama tempo, havas malsaman nuancon.

La varieco de elparolado en la literatura germana lingvo estas ankoraŭ pli granda. Persono parolanta la sudgermanan dialekton (la t. n. Hochdeutsch) ne povas kompreni personon, kiu parolas la nordgermanan (la t. n. Niederdeutsch). Sed eĉ en la limoj de unu sama dialekto la diferencoj de prononco estas konsiderindaj. Goethe mem neglektas la diferencojn inter la vokaloj „ö“ kaj „e“, kiam li rimas la vorton „schön“ kun la vorto „gehen“ (en Faust):

Von Körpern strömt's, die Körper macht es schön,
Ein Körper hemmt's auf seinem Gange;
So, hoff' ich, dauert es nicht lange,
Und mit den Körpern wird's zugrunde gehen.¹

Ĉiuj konas la grandan diferencon de elparolado inter la *kleraj*, *instruitaj* kaj *edukitaj* anglalingvanoj el Usono kaj el Britujo. Sed ankaŭ en Britujo mem ekzistas diferenco, laŭ tio, ĉu la brito devenas el Plymouth, el Edinburgh, el Belfast aŭ el Cambridge. La nuancoj estas ankoraŭ pli frapantaj en Usono, kie la prononcado tre varias. Oni bone rimarkas tion, kiam oni veturas, ekzemple, de la nordaj al la sudaj ŝtatoj. Ni ne parolu tie ĉi pri la prononco de la angla lingvo en la hieraŭaj anglaj kolonioj, kaj ĝenerale pri la t. n. *piĝinaj* lingvoj (pidgin-english)... La angloj estas tre toleremaj, kiam la afero koncernas la elparoladon de ilia lingvo! Ĉu ni, esperantistoj, devas esti pli rigoraj, kiam temas pri elparolado en la internacia lingvo?

¹ Faust, Erster Teil, Studienzimmer, Versoj 1355—1358.



Ce tiaj cirkonstancoj paroli pri *fonetika purismo* en la etnaj lingvoj estas vera sensecaĵo.

La situacio estas simila en Esperanto.

Ĝenerale la esperantistoj (krom la denaskaj kaj tiuj, kiuj sekvis radio-kaj T. V.-kursojn) lernis la internacian lingvon utiligante skribitajn aŭ presitajn tekstojn. Bazo de ilia studado estas la literoj de la Esperanta alfabeto, kiu uzas la grafikajn signojn de la latina alfabeto. Nu, la Esperantaj literoj havas ĉie ajn kaj ĉiam ajn la saman formon, la saman eksteran aspekton: — en Francujo, en Usono, en Ĉinio, en Indonezio, en Japanio, en Aŭstralio la grafikaj signoj (grafemoj) de la sonoj estas ĉiam la samaj. Sed en la vivanta parolo la sonoj, kiujn ili reprezentas, estas terure malsamaj! En realeco montriĝas, ke la sama signo, resp. litero estas tre malsame interpretata kaj prononcata ne nur de la esperantistoj el diversaj kaj malproksimaj landoj, sed ankaŭ de la esperantistoj el diversaj regionoj de unu sama lando. Ekzemple, la sono „l“ por japano estas tute alia, ol la sono „l“ por franco, kiu (l) sialvice estas tre malsama de la sono „l“ por unu bulgaro aŭ anglo. Do, studante Esperanton, ni akiras pri la fonemoj de la internacia lingvo ne akustikajn, sed precipe grafikajn „informojn“, asociante, t. e. koincidegante ĉiun esperantan literon kun la koncerna sono de nia nacilingva fonetika (fonemika) sistemo, aŭ, se tia sono en ĝi ne ekzistas — kun iu proksimume simila sono, kiun ni trovas en ĝi. Ekzemple, pro manko de sono „ŝ“ en la fonetika sistemo de la germana lingvo, la germanaj esperantistoj plej ofte anstataŭas tiun sonon per la sono „ŝ“, kiun ilia lingvo posedas; pro manko de la sono „l“ en la japana fonetika sistemo, la japanaj esperantistoj emas anstataŭi ĝin per la sono „r“ ktp. Sek-

ve de tio, ĉiu nova esperantisto — sed ankaŭ la plimulto de la malnovaj — parolas la internacian lingvon per la sonoj de sia nacilingva fonemika sistemo. Oni ne povas facile liberigi de siaj malnovaj prononcaj kaj artikigaj kutimoj nacilingvaj, farigintaj jam aŭtomatismoj aŭ refleksoj; tial oni perceptas kaj prononcas ĉiun ajn Esperantan fonemon kaj ĉiun ajn kunmetaĵon de Esperantaj fonemoj laŭ la sama maniero, laŭ kiu oni konceptas kaj prononcas la koncernen aŭ la similan fonemon, resp. kunmetaĵon en sia nacia lingvo.

Ĉu estas ebla kaj necesa la normigo de la fonemoj en Esperanto?

La problemo havas kelkajn aspektojn.

En la kampo de la naciaj lingvoj iuj fonologoj kaj fonetikistoj de la pasinteco, rigardante la lingvon precipe el vidpunkto de la naciaj digno, ambicio kaj sento de plivaloro, kaŝitaj plej ofte sub la masko de iaspeca lingva estetiko, elvokis la principon de la t. n. *fonetika purismo*. Vere, la lingvo estas grandparte ne grafika, sed akustika fenomeno kaj ĝis plej alta grado simila al la muziko, aŭ, por uzi la esprimon de Paul Verlaine, ĝi estas „de la musique avant toute chose“ (muziko antaŭ ĉio). Nu, la enmiksigo de tiom da malsamaj kaj kontraŭaj nacilingvaj fonetikaj sistemoj en Esperanto, povas, en iuj cirkonstancoj, krei certan *disonancon* en la interna muziko de la internacia lingvo, en la melodio de la vivanta Esperanta parolo. Sed ĉu muziko konsistas nur el konsonancoj, nur el harmoniaj intervaloj kaj akordoj? Absoluta konsonanco, t. e. akustika trankvilo kaj senmovo, ekzistas nur en la tombejo. Komponaĵo farita nur el konsonancoj estas teda, monotona kaj senviva. La vivo esas movo, konfliktoj, disonanco, varieco, diverseco! Kiel en la vivanta miziko, tiel ankaŭ en la vivanta lingvo, la absoluta paco, ripozo, harmonio, konsonanco, unuvorte „unu-

eco" ofte montriĝas sensuka, laciga, dormiga.

Per tio ĉi mi ne volas aserti, ke oni devas toleri ĉiujn kapricojn kaj ĉiujn strangaĵojn de la elparolado! La „demokrateco“ kaj la toleremo en la fonologia sistemo de la internacia lingvo havas limojn! Fonologia (aŭ fonetika) toleremo aŭ demokrateco tute ne signifas, ke ni devas permesi al Esperanto transformiĝi en ian „piginan“ lingvon! Ankaŭ en la fonetiko de la internacia lingvo estas necesa ia *minimumo* da normoj pri korekta, unueca prononcado, sen kiuj la interkompreno de ĝiaj adeptoj fariĝos preskaŭ nebla. Sed tiuj normoj estas diktataj ne de ia vanta *fonologia dandismo*, nek de ia sentimentalita manierismo. *La ĉefa motivo de fonetika normigo kaj unuecigo de la Esperantaj fonemoj estas la imperativa bezono de klareco kaj kompreneblo.*

La principo de la *klareco* kaj kompreneblo estas la plej grava principo en fonologio, en lingvistiko ĝenerale. Sed des pli grava ĝi montriĝas en interlingvistiko. Parolante en Esperanto, ni devas ĉiumomente demandi nin mem: „Ĉu la sono, la vorto aŭ la frazo, kiun mi uzas en tiu ĉi momento, estas sufiĉe klara kaj komprenebla por la esperantisto el ĉiuj rasoj, gentoj kaj nacioj de la mondo? Ĉu mi ne enmiksas ian nacilingvan idiotismon, ian neklaran vortordon aŭ vortkunmeton, ian nekutiman fonemon malfacile kompreneblan por aliaj popoloj? Ĉu la vokaloj aŭ kostonantoj de mia parolo ne estas tre malfacile analizeblaj kaj aŭdeblaj de miaj aŭskultantoj pro troa mikso de fonetikaj elementoj el mia nacia lingvo?

Kiam ni parolas pri *normigo* kaj *unuecigo* de la prononco en Esperanto, ni tre bone scias, ke plena, absoluta unuecigo estas nek ebla, nek eĉ dezirinda. El muzika vidpunkto, la varieco de la pronocado en Esperanto

donas al la parolantoj riĉan provizon de nuancoj kaj tembroj (t. n. harmonoj), kiuj permesas kolorigi la parolon. Absoluta plena unuecigo de la elparolado en Esperanto por ĉiuj nacioj estus analoga al dekreto, kiu celus vesti ĉiujn homojn sur la Tero en la sama uniformo. La disonancoj en la parolo, kiel la disonancoj de la muziko (ekz. la malproksimaj harmonoj, tiel lerte ekspluatataj de la komponistoj-impresionistoj — Debussy, Ravel k. c.), ofte havas gravan estetikan funkcion, kaj oni nek povas, nek devas ilin forigi entute. Sed oni povas *redukti* la plej akrajn disonancojn en la internacia lingvo ĝis certa minimumo, kiu ne ŝokos la estetikajn guston de l' aŭskultanto kaj ne ĝenos la klarecon kaj la komprenon. En tiu senco oni ŝatas deklari, ke „honora devo de ĉiu esperantisto estas akiri ĝustan, internacian kaj belsonan elparolon“.¹ Sed kion oni devas kompreni sub la vortoj „ĝusta elparolo“? Kaj kia estas la „internacia elparolo“? Kaj kion signifas la esprimo „belsona elparolo“? Jen estas demandoj, al kiuj neniu lernolibro, eĉ neniu speciala studo, donas klaran kaj kontentigan respondon. Ili apartenas al la sfero de la normativa aŭ preskriba fonologio, kies vojo kruciĝas kun tiuj de la psikologio kaj de la estetiko. Por fiksi la normojn de „ĝusta, internacia kaj belsona elparolo“, oni devas fiksi laŭ la esprimo de la usona lingvisto G. K. Zipf, „la idealan modelon, al kiu ĉiuj parolantoj devas proksimiĝi.“² (Atendante tiun esploran laboron, oni povas provizore fiksi kiel modelon la fonetikan sistemon de la itala lingvo, kiu tre proksimiĝas al la Esperanta).

¹ Henrik Seppik, *La tuta Esperanto*, Sofia, 1971, p. 7.

² Vidu G. K. Zipf, *The Psychobiology of Language*, Boston, 1935, p. 195.

(La fino en n-ro 6)



ĈASTUŜKOJ¹

Kontraŭ niaj krokodiloj,²
verdaĵ balbutantaj miloj,
jen ĉastuŝko, jen slogano, —
kantu ĝin samideano!

Ĉie sonas la babilo
de la pigra krokodilo,
ĉar en kapo de l' pigrul'
estas densa nur nebul'.

Se lernanto krokodilas,
lingvon tuj li asimilas.
Post dek jaroj tre facile
li parolos krokodile.

¹ Ĉastuŝko — populara strofeto aŭ kanzoneto.

² Krokodiloj estas ŝerce nomataj tiuj esperantistoj, kiuj preferas interparoli en sia gepatra lingvo kaj ne en Esperanto.

PRI LA SCIOJ

Oni demandis filozofon:

— Kion vi pensas pri la konoj de la homoj?

La filozofo respondis:

— Tiu, kiu nenion scias kaj ne scias, ke li ne scias, estas stultulo. Tia homo estas malesperiga, kaj oni devas konfidi al li nenium laboron.

— Tiu, kiu ne scias kaj scias, ke li ne scias, estas prudenta. Lin oni devas instrui.

— Tiu, kiu scias kaj ne scias, ke li scias, estas dormanta. Lin oni devas vekti.

— Tiu, kiu scias kaj scias, ke li scias, estas saĝulo. Lin oni devas imiti.

NOVAJ PROVERBOJ

Kiun vundis incendio, tiu blovas al glacio.

Sen lukto mankas frukto.

Kiu du leporojn ĉasas, tiu ambaŭ preterlasas.

Belega promeso kun tuja forgeso.

Kian vi litajon faros, tian dormon vi preparos.

Per konstantaj ripetoj al scio-sekretoj.

Kiom pezas la nubo?

Sciencistoj el Alma-Ata (Sovetunio) konstatis, ke ĉiu nubo, trapasanta super la stepoj de Kazaha SSR, entenas 50 000 tunojn da akvo. La „pesado“ de la nubo ebligis difini la potencialajn rezervaĵojn de la atmosfera humido super la senpluvaj regionoj, kie estas necese kaŭzi artefaritan pluvon.

*Por gaja humoro de samideano
ekde komencanto ĝis akademiano.*

PLENTAGAJ SIEĜOJ FARE DE LA REĜOJ

Meze de luksilumino
pendas anonc' en vitrino:

— Vi nin vizitos kun pleja kontent',
ĉiu reĝo estas nia klient'!

Post unu nur tag' ĉe vendej' konkurenca
aperis anonco iom diferenca:

— Regas ĉe ni nur tiu ĉi leĝo:
ĉiu kliento estas nia ... reĝo.

*Ambaŭ versaĵetoj — de Roman Grinŝpan
Taŝkent, USSR*

ĈU VI SCIAS?...

Kiu plano flugas?

Kiu *matur*o plifortigas betonan konstruaĵon?

Kiu *kono* pendas sur muro?

Kiu *roko* estas arkitektura stilo?

Kiu *tono* estas plej firme artefarite ŝtono?

Kiu *zono* estas sovaĝa besto?

Rimarko: La respondoj aperos en n-ro 7—8

Sciigoj el GDR

La Esperanto-grupo de Dresden organizas ekspozicion okaze de la 25-a datreveno de la fondiĝo de GDR. Bonvolu sendi al ĝi salutojn ĝis la komenco de septembro ĉ. j. La germanaj kamaradoj rekompencos per prospekto pri GDR aŭ per E-jurnalo.

Skribu al: s-no Evelyn Berndt, GDR-806 Dresden, Helgolandstr. 9b.

*

La esperantistoj el Berlin, GDR, ĉiusemajne merkrede renkontiĝas en „Klub—72, 1055 Berlin, Prenzlauer Allee 217, 19-a horo. La klubbejo estas atingebla per S-Bahn (urba trajno) al stacio Prenzlauer Allee, de tie per tramo 3 staciojn direkte al Aleksander-placo.

Redakta Komitato: Kunĉo VĀLEV (ĉefredaktoro), Nevenka ALEKSIEVA, Marin BĀCEV, Ĥristo GOROV, Asen GRIGOROV, Stefa ĤRISTOVA, Nenka JONKOV, Krĉstju KARUCIN, Haim LEVI.

Administra sekretario: Minko CONKOVSKI

Teknika aranĝanto: Prodan PRODANOV

Korektis: Minko Conkovski

Sofio, poŝtkesto 66

Tel. 31-00-29

deziras korespondi

Bulgario

Dimitr Kostadinov — Zavod „Balkan“, ceh 23, Loveŝ (kun ĉi pri ĉt.).

Moni Moynov — v. Bahovica, Loveŝko (kun ĉi. pri ĉt.).

Ĉeĥoslovakio

Meislova Elfriede — 38208 Chvalšiny, Hejdlov 10 (23-jara studentino — pri lingvoj, literaturo, vojaĝoj, muziko).

Mlynar Vaclav — 11000 Rraha 1, Valentinska 11 n (emerito — pri turismo, lingvoj, pentraĵoj).

Mnoučkova Blanka — 33214 Chotešov, Mantovska 450 (19-jara vendistino — pri muziko, filmoj, lit-ro, lingvoj).

Mislivec Zdenek — 51213 Božkov 110, (40-jara teknikisto — pri amatora aviadila konstruado).

Povolna Ruzena — 73921 Paskov, namesti 47 (50-jara flegistino — pri muziko, lit-ro, vojaĝoj).

Taitlova Hanka — 36005 Karlovy Vary, Engelsova 25, (65-jara — pri turismo, lit-ro, krucvortenigmo).

GDR

German Rockwitz — 9433 Bejersfeld Clara Cetkinst. 8 (15-jara lernantino kun ĉi).

Bernhard Winter — 943 Schwarzenberg Dr Otto Nuschkestr. 8 (54-jara masaĝisto — kun ĉi).

Kurt Lier — 9401 Alberndorf/Erzg. August Bebelstr. 37 B (70-jara — pri ĉt.).

Ernst Kund — 724 Grimma Paul Cerhardstr. 21 (70-jara — pri ĉt.).

Hennig Uve Gross — 9431 Bermsgrün 64f Kr. Schwarzenberg (15-jara lernanto).

Werner Berndt — 94 AUE/Erzg. Pr. Dieckmannstr. 4 (38-jara inĝeniero).

Heinz Siegel — 92 Freiberg Dammstr. 49C (52-jara — kun ĉi pri ĉt.; interŝanĝas bk).

Joachim Kretschmer — 9312 Kurort Oberweisenthal Keilstergerstr (interŝanĝas bk).

Pollando

Andreo Poterek — ul. Koszarova 9-a 410, 83-324, Bydgoszcz (24-jara studento — pri turismo, pentraĵoj, orientologio, bk).

Vanda Novak — 96-100 Skierniewice, Stryt. pont. 32 (21-jara studentino de medicino — bk, pm, gramofondiskoj, filmaktoroj, vojaĝoj, geografio).

Włodzimierz Malinowski, — ul. Tuwina 28/6, 59-902 Zgorzelec (librotenisto — kun ĉi pri bk, pm, esperantaĵoj).

Pawel Kuligilwicz — str. Makuszyńskiego 3 m 22, 93-248 Łódź (16-jara lernanto de liceo „Zamenhof“ — kun gebulgaroj pri moderna muziko, sporto, futbalo, pm, gram. diskaj).

Tereza Bujek — ul. Kleberga 43, 21-314 Kock (18-jara — pri Esperanto, geografio, historio, turismo, moderna muziko).

Sovetunio

Juri Saviir — 200 013 Tallinn, kauba 40-10 Estonio (kun ĉi pri ĉt, moneroj).

Raus Eduard — 200 021 Tallinn, 21, Estonio, (56-jara konstruisto-teknikisto — kun ĉi pri ĉt).

Jasenko Vladimir Iv. — Ufgorod 204 000, ul. Sovetskaja 98, kv 3. obl. Zakarpatskaja (22-jara studento en matematiko fakultato — pri pentraĵoj, kosmo, sporto).

Karazinajta Rima — 235 410 Ŝiauliai, str. Gorkij 15. Litovio (18-jara studentino en pedagogia instituto — kun ĉi pri ĉt).

Harisov Damir — Baŝkirio 450 003, Ufa 3, ul. Mala Ahtirskaja 20 (17-jara — kun ĉi pri ĉt).

Junuloj dez. korespondi individue kun ĉi pri ĉt. Respondo certa. Komuna adreso; USSR 346 430, Novoŝerkask, ŝk-internat 33, Esperanto-rondeto.

Heiki Kalam — Viljandi, Musti TEE 5, Estonio (lernanto de 8 klaso — bk, pm, insignoj k. a.).

Ni multobligos novajn listojn de sonbendamikoj el la tuta mondo en aŭgusto de tiu ĉi jaro kaj ni petas, ke sonbendamikoj sendu detalojn al ni pri magnetofonoj, ĉefinteresoj ktp. antaŭ la fino de julio.

La novajn listojn ni volonte sendos kontraŭ respond-kupono.

Adreso: „Sonbendamikoj“, 2 Shagbrook Cottages, Buckland Road Reigate, Surrey. Britio RH2 9RE.

La 15-an de aprilo ĉ. j. en Sofio forpasis subite s-ano

MIĤAIL JANKOV MEKIKĈIEV

67-jara. Esperantisto ekde sia junaĝo, li disvolvis aktivan E-agadon inter la fervojistoj.

Mekikĉiev estis membro de CK de BEA, poste — de ĝia Kontrola Komisiono.

La 24 de marto ĉ. j. en Moskvo forpasis la eminenta aganto de la soveta kaj internacia E-movadoj

D-RO K. A. LAVRENTJEV

80-jara. Esperantisto de 1912 j. li dum sia tuta vivo estis fervora disvastiganto de Esperanto. Dum la lastaj jaroj d-ro Lavrentjev estis sekretario de Moskva Internacia E-Klubo (MIEK).

Sinceraĵn kondolencojn!